

Leonhard Widmer,  
Svislanda psalmo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*Internacilingva versio de la - ekde 1981-04-01 - valida Svisa nacia himno, tradukita laŭ la origina germana-lingva teksto*

Venas vi en la aŭror',  
Vidas en mateno hor'  
Vin ni jen en Via glor', ho Sinjor'!  
Dum ruĝiĝas montglacio,  
Preĝu, homoj de Svisio!  
Antaŭsentas ĉiuj ni,<sup>2</sup>  
Dio, Vin en la patri',  
Dio, Vin en kara la patri'!

En la ardo de l' montar',  
En la brilo de l' stelar'  
trovas ni vin kun ador', ho Sinjor'!  
En ĉiela alta spaco  
Ĝoje sonĝas mi en paco!  
Antaŭsentas ĉiuj ni,  
Dio, Vin en la patri',  
Dio, Vin en kara la patri'!

Supre en la nubo-mar',  
En la alto de l' montar',  
Serĉas mi vin en nebul', Eternul'!  
Kaj el la vual' nubara  
Sin vidigas Suno klara.  
Antaŭsentas ĉiuj ni,  
Dio, Vin en la patri',  
Dio, Vin en kara la patri'!

...

---

<sup>2</sup>aŭ:

Vin jam antaŭsentas ni  
En patrujo nia, Di',  
En patrujo nia kara, Di'!

En ŝtormbruo kaj danĝer'  
Vi nin ŝirmas sur la Ter'.  
Estas ĉiopova vi, kara Di'!  
En fulmtondro kaj hororo  
Fidu ni al la Sinjoro!  
Antaŭsentas ĉiuj ni,  
Dio, Vin en la patri',  
Dio, Vin en kara la patri'!

*Traduko de la Germana poemo "Schweizerpsalm" de LEONHARD WIDMER (Leonhardo Vidmero, \*1809 – †1867) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-07-11.*

*MR-422-1 / Arg-257-521 (2014-04-23 10:57:37)*

*Kantata estas la himno laŭ melodio, kiun la svisa pastro kaj komponisto Alberik Zwyssig (1848 - 1854) komponis en la jaro 1841, origine por la mesa himno je la psalmteksto "Te diligam, Domine" (= Mi amu vin, Sinjoro). Prenita el la interretejo <http://de.wikipedia.org/wiki/Schweizerpsalm>*